Jarkolekto : 2012 | Numero : 1 | Paĝo : 1

# La *Voĉo de Amikejo*

Informilo pri ***Senlime*** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

BELGIO NEDERLANDO GERMANIO
E

***Senlime***
Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française

**En cas de non-distribution, renvoyer à**
H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org

**Editeur responsable**
**Responsa eldonanto +**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
GSM +32-486-947.957
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe www.senlime.org**

**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Bonvolu pagi, prefere antaŭ la jarfino, **NUR** al la konto :
**979-5327148-10**
IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)
de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

La jara kotizo al ***Senlime*** (10 €) estas disigita de la abono al la papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Dankon pro via subtena kotizo!**
**p. 2 : Niaj programeroj lupee**
**p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (2/2)**
**p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo**
**p. 5 : Charles Schriewer**
**p. 6 : Verviersa angulo : «Moresnet»**

## Dankon pro via subtena kotizo

Sojle de nova jaro, ni deziras al vi bonan kaj feliĉan jaron 2012 : dum ĝi realiĝu viaj plej belaj revoj kaj sonĝoj !

Dendube, plia disvastiĝo de esperanto kaj do la bonfarto kaj la efikeco de la diversaj organizaĵoj kiuj kvazaŭ «militas» tiucele ankaŭ plaĉus al vi…

Pensu ke malfeliĉe kreskas la kostoj (luprenado de ejoj, reklamado en gazetoj, k.t.p. tute ne estas senpagaj): ve malkreskas la ŝtata helpo, ne malkresku la kotizantaro !

Ni invitas vin al subteno de Esperantista Grupo de Verviers kaj ***Senlime***, pagante ne nur vian kotizon da 25 EUR por A.P.E. (kiun ni ja devas transdoni al tiu asocio, konservante nur 2,5 EUR) sed ankaŭ la apartan kotizon da 10 EUR por ***Senlime***.

Tiu lasta asocio postkuras apartan celon: malaperigo de la (land)limoj favore al la ampleksigo de la rilatoj inter malsamlandanoj, kompreneble pere de esperanto, kaj tio aparte en la trilanda regiono inter Belgio, Nederlando kaj Germanio, kie iam kuŝis Neŭtrala Moresneto, landeto esperantista konata de ni sub la nomo «***Amikejo***».

Koran dankon pro via amika kaj «senlima» subteno !



# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## Konversacia tablo

Unuafojo, dum la «vintra paŭzo», ***Senlime*** proponas al siaj membroj konversaci-tablon. Tiel ili havos plian rimedon (krom libroj, filmoj, reto, k.t.p.) por konservi kontakton kun la lingvo esperanto kaj eĉ plibonigi sian lingvo-nivelon.

Nia intenco estas ankaŭ somere proponi tion, kune kun promenada programo (laŭ la vetero) por pli bone konatigi al ili la trilandliman regionon de Kelmis (Amikejo).

Tiaj konversaci-tabloj jam de pluraj jaroj funkcias per plej diversaj lingvoj, interalie en Vervierso (ili ricevis la Eŭropan markon pri lingvoj en 2002).

Ili arigas +/- 7 aŭ 8 personojn kun baza kono de la celita lingvo kaj animanto, kiu proponas temojn kaj uzas fakajn teknikojn kaj materialon. Ofte li aŭ ŝi apogas sin sur la vivspertoj kaj sentoj de la partoprenantoj.

Kompreneble la okazigo aŭ ne de tiuj tabloj en Kelmis ĉefe dependos de la anoncita vetero. La malmultnombraj esperantistoj ne risku sian sanon kaj vivon sur danĝeraj vojoj ! Por ne senutile vojaĝi al Kelmis, bonvolu lastminute informiĝi pri tio ĉe la sube menciita responsulo.

**01-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Konversacia tablo***".

Inf. J.M. **Jacques**
jacques@senlime.org

## Debato pri estonto de *Senlime*.

***Senlime*** en la esperantista mondo estas konata kiel simpatia sed malgranda grupo. Evidente, la ebleco regule renkontiĝi inter esperantistoj de malsamaj gepatraj lingvoj allogas… sed praktike, la popol-denso, kaj la membro-nombro de esperanto-grupo, en lima regiono kiel Kelmis estas pli malgranda ol en centraj urboj kiel Bruselo aŭ Kairo ekz-e!

Alia problemo estas la leĝa organizo de tia trilanda asocio : **AISPC** (Asocio internacia sen profita celo) estas malbone konata organizmaniero, dum **ASPC** estas ununacia afero, tamen kun ebleco posedi agad-ejo(j)n en aliaj landoj.

***Senlime*** (provizore?) do restas «***fakta***» asocio, kun la konataj (aŭ ne !) riskoj por la membroj kaj la asocio mem (kiu ekzemple ne rajtas leĝe ricevi mon-donacon).

Sin metas do diversaj demandoj kaj aŭdiĝas kelkaj respondoj, kiujn ni ĉi-vespere aŭskultos…

- reklami en la tri landoj (kaj ĉefe en Marnolando kaj Akeno, kie nia membraro danĝere malkreskis) ?
- organizi rekt-metodan kurson (en Kelmis ?) por lernantoj el la tri landoj, kiuj tiel tuj spertos la ĝojon facile komuniki kun alilandanoj ?
- transiri de fakta al leĝa asocio ?
- … ?

**02-17** 20h00 BE-Kelmis, Select: ***Debato pri estonto de Senlime***

Inf. J.M. **Jacques**
jacques@senlime.org

## Interlerneja korespondado

Inter la jaroj 1972 kaj 1974 Raymond **Demarche** estis titolulo de la kvara klaso en elementa lernejo, en la Verviersa kvartalo "Hougnes".

Liaj knaboj interŝanĝis lernejajn laboraĵojn kun japana klaso de la vilaĝo Kerimai, sur la insulo Hokajdo. La instruisto azia nomiĝis **Toyoaki Mukai** († en junio 2008). La du instruistoj korespondis esperantlingve.

Raymond **Demarche** gvidis esperanto-kurson. La gekursanoj partoprenis al la revuo internacia "***Grajnoj en vento***". Li ankaŭ korespondis franclingve dum unu jaro kun klaso en Arles, Francia urbo ĝemeligita kun Verviers.

Tio okazis dum la unua parto de lia kariero.

Dum lia rakonto, R. **Demarche** faros ofte ekstertemaĵojn, dum kiuj li montros esceptajn "trezorojn".

Aŭskultinda prelego !

Pri interlerneja korespondado, esperanto, **Freinet** kaj lia movado, vidu ankaŭ nian retpaĝon pri la filmo "***Le Maître qui laissait les enfants rêver***": http://www.senlime.be/Kino/Freinet.htm

**03-16** 20h00 BE-Kelmis, Select : "***Kiel plurmaniere mi interesis miajn lernintojn***", prelego de Raymond **Demarche.**

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2011-2012 (2/2)




***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro : Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

**01-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: ***konversacia tablo***.
Inf. jacques@senlime.org

**02-17** 20h00 BE-Kelmis, Select: ***debato pri la estonto de Senlime***.
Inf. jacques@senlime.org

**03-16** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Kiel plurmaniere mi interesis miajn lernintojn***", prelego de Raymond **Demarche.**
Inf. jacques@senlime.org

**04-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: "***Charles Schriewer***". Prelego de M. **Schrymecker**.
Inf. jacques@senlime.org

**05-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Filozofia vidpunkto pri **Harry Potter**", prelego de Charles **Norga**.
Inf. norga@senlime.org

**06-15** 20h00 BE-Kelmis, Select: karaoke de ***Senlime.***
Inf. lousberg@senlime.org

✪

Pliaj kunvenoj en BE-Kelmis, Select, la: **07-20**, **08-17**, **09-21**, **10-19**, **11-16** kaj **12-09**.

**20-01** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: ***table de conversation***.
Inf. jacques@senlime.org

**17-02** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: ***débat sur l'avenir de Senlime***.
Inf. jacques@senlime.org

**16-03** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Comment j'intéres-sais de plusieurs manières mes élèves***", conférence de Raymond **Demarche.**
Inf. jacques@senlime.org

**20-04** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "***Charles Schriewer***", conf. de M. **Schrymecker**.
Inf. jacques@senlime.org

**18-05** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: "Point de vue philo-sophique sur **Harry Potter**", conférence de Charles **Norga**.
Inf. norga@senlime.org

**15-06** 20h00 BE-Kelmis, Sélect: karaoké de ***Senlime.***
Inf. lousberg@senlime.org

✪

Réunions suivantes au Sélect, La Calamine: **20-07, 17-08, 21-09**, **19-10**, **16-11** et **09-12**.

# Novaĵoj pri KELMIS✪.

## (el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

**Lingva enmergiĝo**

La germanlingva ministro pri instruado ĵus inaŭguris en Kelmis la unuan dulingvan "patrinan" lernejon en la germanlingva parto de Belgio. 40% de la aktivaĵoj tie estos franclingvaj. Tuj aliĝis 97 etetaj lernantoj, ĉu franc-, german- aŭ du-lingvaj! La ministro precizigis ke la lernejo (Ateneo Franck) disponos pri homa kaj scienca helpo por certigi la kvaliton de la projekto kaj pluraj deeksteraj taksadoj okazos por ĝin kontroli.

**NEUTRALIA**

La iamaj karabenistoj (pafistoj) estis la temo de tiu popola festo, kiu rememorigas pri ĉiuj aspektoj de la iama neŭtrala teritorio de Moresnet (Amikejo laŭ la esperantistoj). Ĝi okazis la 3an kaj 4an de septembro kun riĉa programo: ekspozicio pri tiu temo, koncerto sub tendego kun la grupoj «Klanglos» kaj «Stressless», ununura koncerto de «The East Belgian Swing Band & Strings», diservo en loka dialekto (platt), "frühschoppen-musical" kaj strata irantaro kun pafantoj en iama kostumo... kun pafmontrado kaj ebleco mem ekzerciĝi. La lernantoj de la ateneo Frank prezentis interesan verkon pri la signifo de la Kelmisaj strat-nomoj. Kompren-eble ankaŭ, la centro de la vilaĝo estis rezervita por piedirantoj, kiuj ĝuis pri la kutima "kermeso". Ve, mankis la esperantistoj...

**Florumita irantaro**

Ĉiun duan jaron, la "corso" florumita de Hergenrath allogas pli-malpli 10 000 spektantojn. 14 multkoloraj ĉaroj partoprenis tiun 19an eldonon de la festo, dimanĉon la 21an de aŭgusto. Matene okazis ĉionvendado en la stratoj kaj diversaj aktivaĵoj por la infanoj. Rendevuo post du jaroj por la 20a festo de la floroj!

**Irantaro kun torĉoj**



Neelĉerpebla kutimo, kiu ĉiujare kunigas ĉirkaŭ 3000 parto-prenantojn, la irantaro kun torĉoj okaze de la festo de Sankta Marteno tiun dimanĉon (la 6an de novembro) prilumis la stratojn de Kelmiso. Kiel kutime, ĉio komenciĝis en la paroĥa preĝejo, per la sabrobato de la sanktulo partigante sian mantelon kun almozpetanto. Post tio, ĉio estis finpreta por la muzika irantado tra la stratoj.

**Karnavalo**

Se, kiel sciate, la karnavalo en Kelmis ĉiam komenciĝas la 11an de novembro je 11h11 (per elekto da la karnavala princo), ĉijare la komunumo de Plombières novigis, dimanĉon la 6an de novembro, en la kultura salonego de Montzen, kie la tiea karnavala komitato surtronigis sian unuan karnavalan princon de la infanoj, William la 1a Jungbluth.

**Patronage**

Oficiale inaŭgurita en majo 1911, la "Patronage St. Louis" (Ludoviko!) situas centre de Kelmiso, ene de la iama Amikejo, precize strato de la Patronage 29. Ĝi apartenas al la A.S.P.C. "Pfarr- und Jugendwerke»" dum la komunumo Kelmis longdaŭre luprenis ĝin ek de aŭgusto 2003. La trinkejon kaj la fest-salonegon estras koncesiulo.

Gravaj renovigaj kaj pligrandigaj laboroj jam okazis en 1993, dank'al kio la Patronage disponas pri festsalonego (32 x 14 m) kun granda scenejo (13 x 14 m) kaj sube vest-, duŝ- kaj necesejoj.
La ĉefaj grandaj eventoj de Kelmis okazas tie: teatro, karnavalo, koncertoj,...



La "Patronage" ankaŭ disponas pri pli malgranda salono por privataj festoj.

Pluraj ĉambregoj/kunvenejoj, duŝ- kaj necesejoj - ankaŭ nun konstruataj - baldaŭ disponeblos antaŭ apuda herbejo.

# Charles SCHRIEWER

**Tri gravuloj de la Esperantista grupo de *Amikejo*:**



Doktoro Wilhelm **Molly**
1838-1919



Profesoro Gustave **Roy**
1859-1943



Leŭtenanto Charles **Schriewer**
1889-1916

*La 20an de aprilo 2012 (20h) en Kelmis (Select), Mathieu **Schrymecker** prelegos pri Charles **Schriewer**, unu el la 3 plej gravuloj de la Esperantista grupo de **Amikejo**.*

Tiu-ĉi prelego celas honori la unuan prezidanton de la iama esperantista grupo de **Amikejo**.

Ĉar la patro de Charles trovis laboron en la zinkentrepreno «Vieille Montagne» en Neŭtrala Moresnet, la familio **Schriewer** forlasis Ensival-on (urbeto apud Verviers) kaj translokiĝis al Kelmis / La Calamine.

Ĉi-tie Charles pasigis sian junecon kaj iĝis profesie libro-vendisto kaj eldonisto. Li laboris en gepatra magazeno, kiu situis en la Kapelo-strato.

Jam antaŭ la jaro 1908 Charles esperantiĝis.

Kie li lernis esperanton ?
Tiu demando restas por ni ĝis nun sen respondo.

Charles **Schriewer** estis grava kunlaboranto de la franca profesoro Gustave Roy – iniciatinto de la projekto «***Amikejo***».
Decideme sinjoro **Schriewer** progresigis la lokan esperanto-movadon.

Bedaŭrinde por la Eo-klubo «Amikejo» samideano Charles **Schriewer** soldatiĝis.

Sendube tio signifis grandan perdon por la loka esperantista grupo. Kiel soldato en la kazerno de la 12-a linio en Chênée (urbeto apud Lieĝo), Charles iĝis membro de la belga taĉmento en Ĉinio.

Klarigo : apud Pekino, Belgio posedis malgrandan teritorion, kiun kelkaj belgaj soldatoj simbole gardis.

Ĉi-tie soldato **Schriewer** restis tre fidela al Esperanto.

Li daŭrigis labori kiel delegito de U.E.A. – Li instruis la Zamenhofan lingvon al belgaj kaj francaj soldatoj, eĉ al ĉinoj.

Sendepende de Esperanto, Charles **Schriewer** obtenis oficistan laboron en la belga ambasadorejo en Pekino.

Pro la unua mondmilito Charles **Schriewer** forlasis Ĉinion por militservi en Afriko.

Nia kara kaj tre estimata samideano mortis la lastan tagon de la jaro 1916 en Kigoma, apud la Lago Tanganjika (norde).

Ilustraĵoj kiel bildkartoj, artikoloj, fotoj, mapoj kaj eĉ operetmuziko akompanos la prelegon.

Mathieu **Schrymecker**

# Verviersa Angulo

Verviersa Esperanto Grupo

# Moresnet Récits du quatrième pays.

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Jean-Pol Sparenberg
20 Ruelle de Thuin
6540 LOBBES
Tél. 071/59.15.42

---

**Cotisations**

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année une ou plusieurs des cotisations suivantes au compte

**979-5327148-10**

IBAN : BE41 9795 3271 4810
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*La cotisation de **Senlime** est obligatoire et fixée à 10 EUR. Ce bulletin d'information est intégré à la revue «Espéranto en marche», comprise dans la cotisation à APE.*

**D'avance, merci à tous !**

**A.P.E. 2012** (EGV) **25 €**
**U.E.A. 2012** (MA-T) **62 €**
***Senlime*** **(cotisation 2012) 10 €**

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant ainsi que l'association bénéficiaire: *«cotisation de.... pour....».***

Si vous ne lisez pas régulièrement cette revue, ou pas depuis longtemps, vous vous demandez sans doute pourquoi le groupe espérantiste de Verviers se réunit toujours à La Calamine et non à Verviers. Ce n'est pas seulement pour se rapprocher des espérantistes allemands et hollandais, c'est aussi pour faire revivre le grand rêve d'«***Amikejo***», le lieu de l'amitié en espéranto.

Voici quelques années, cette histoire avait fait l'objet d'une représentation théâtrale d'une œuvre de notre historien local, Mathieu **Schrymecker**, en espéranto, à l'occasion d'une grande réunion espérantiste au Sélect, à la Calamine.

C'est à présent le théâtre de la Place à Liège qui nous a proposé, du 7 au 9 décembre 2011 une nouvelle version, œuvre de Paul **Pourveur** et Lot **Vekemans** (en néerlandais avec soustitres en français) : «***Moresnet***».

En 1816, par un étrange tour de passe-passe diplomatique et autour d'une convoitée mine de zinc, naît le micro-état de Moresnet, au carrefour des frontières belge, hollandaise et allemande.

Vous pouvez encore en voir les traces en visitant le lieu dit «les trois frontières», sur les hauteurs de Gemmenich. A l'intersection des trois frontières restent visibles, non pas trois mais, quatre zones correspondant aux pays de l'époque, la plus étroite étant «Moresnet Neutre».




La mine de zinc épuisée, un médecin charismatique, Wilhelm **Molly**, et un professeur français, Gustave **Roy**, rêvent de transformer le territoire neutre en «***Amikejo***», «lieu d'amitié» en Espéranto, le tout premier état espérantiste. Mais la fièvre nationaliste et les flammes de la première guerre mondiale auront raison de cette utopie.

«***Moresnet***», créé dans le cadre du projet eurégional REGIOThéâtre o REGIODanse par la troupe hasseltoise «**De Queeste**», est une vivifiante interrogation sur la question des frontières et de la nation. Un spectacle lourd de sens dans une Belgique qui se cherche un avenir…

***Texte*** : Paul **Pourveur** & Lot **Vekemans.**
***Mise en scène*** : Christophe **Aussems.**
***Avec*** : Suzanne **Grotenhuis**, Tom **Ternest**, Bram **Van Der Kelen**, Lien **De Graeve.**
***Musique live*** : Bert **Hornikx.**
***Costumes*** : Jorine **van Beek.**